

sub la suda kruco ★
marto-junio 2014

ESPERANTO



**99ª UNIVERSALA
KONGRESO
de ESPERANTO**

Bonaero,
25 julio - 2 aŭgusto
2014

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIIOJ

Volumo 22 [1] numero 115 marto-junio 2014

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Kam Lee, David Ryan
Kontaktadreso | info@melburno.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, info@melburno.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de julio 2014

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necespeglas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2014 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILLO Supre: Esperantistoj sidante apud metala skulptaĵo (Nest III verkita de Richard Moffatt, 2007) ĉe la Kanbera arbarara rigardejo, Dairy Farmers Hill. Meze: AEA Estraro de 2014: (Maldekstre al dekstre)

Malantaŭa vico: Heather Heldzingen, Sandor Horvath, Jonathan Cooper, Kam Lee. Antaŭa vico: Indrani Beharri-Lal, Esther Parris kaj Margaret Chaldecott.

Malsupre: Reklamo por la Universala Kongreso en Bonaero, Argentino, 2014. **SUR LA MALANTAŬA KOVRILLO** Eventoj dum la Kanbera Kongreso, 2014.

Supre: Antaŭporda loko de Parlamenta Domo, Kanbero.

Malsupre: Gazona loko apud Nacia Galerio kaj Lago de Burley Griffin, Kanbero.

5. Ne tuŝu mian lingvon!



6. Sekretoj de la Insulo King



8. Kion ni manĝos en la estonteco?



10. La Guto Malgranda



13. Gloraj tagoj en Kanbero
kaj postkongresaj pensoj



23. Sukcesa internacia
Esperantofilma konkurso



30. Kanbera kongresa libroservo

marto-junio, du mil dekkvar

Mi ĝenerale ne ŝatas legi nekrologojn en Esperanto-revuo. Mi kredas ke tio donas impreson ke nia movado mortas. Kie aperas informoj pri novaj membroj?

Tamen, mi skribas ĉi tiun antaŭparolon kelkajn horojn post ĉeesti kaj paroli ĉe la funebra ceremonio de Gwenda Sutton. Gwenda estis bone konata en Nov-Zelando kaj Aŭstralio, kaj fakte tra la tuta mondo. Ŝi estis esperantisto dum multaj jardekoj kaj instruis Esperanton al centoj da homoj. Kiel junulo, mi konis ŝin nur kvar monatojn post kiam mi komencis lerni Esperanton kaj ŝi multe helpis kaj instigis min. Pro tio, Gwenda estis konstanta akompananto en mia esperantista vivo. Ŝia morto (pace, je la aĝo de 89 jaroj) malfeliĉigis min.

Ni devas danki niajn veteranojn kiel Gwenda. Dum jaroj ili portis la standardon de Esperanto kaj instruis Esperanton al novaj generacioj. Ili certigis ke Esperanto ne mortas. Samtempe, ni devas agnoski ke niaj veteranoj kaj maljunuloj malaperas, sed ni devas ĝoji. Niaj pioniroj mortas aŭ ne plu aktivas sed novaj homoj okupas ilian lokon. Ekzemple, en Januaro dum ferioj en Meksikio mi renkontis grupon de novaj, junaj komencantoj. Tie la movado havas promesoplenan estontecon.

Ni neniam forgesos Gwenda, sed novaj elstaruloj – eble homoj kiuj ankoraŭ ne apartenas al nia movado – okupos ŝian lokon por aktivaj, propagandi, kaj instigi la postan generacion.

Recenzo de *Don't Touch My Language: Attitudes Toward Institutional Language Reforms*, de Antonio Reyes, de Chris Krägeloh (Auckland).

En la pasintjara volumo 2 de la lingvosciencia revuo *Current Issues in Language Planning* aperis artikolo de Antonio Reyes de la usona Washington and Lee University pri reagoj al oficialaj lingvaj reformoj de la hispana lingvo. Multaj esperantistoj ne nur interesiĝas pri planitaj lingvoj sed ankaŭ ofte pli ĝenerale pri lingva planado, kaj pro tio la supre menciita artikolo verŝajne estos interesa por la legantaro de ESK.

En la angle parolantaj partoj de la mondo kiel Aŭstralio kaj Nov-Zelando, homoj ofte ne konscias ke lingva planado okazas en multaj lingvoj relative forte. Reyes priskribas la ortografiajn reformojn de la franca kaj germana lingvoj, kiuj ambaŭ komencis dum la 1990aj jaroj kaj kiuj ankaŭ ambaŭ ricevis fortajn negativajn reagojn de la ĝenerala publiko kaj tagjurnaloj. En 2010, la Reĝa Hispana Akademio (Real Academia Española, aŭ RAE) proponis ŝanĝojn al la literumado de kelkaj vortoj en la hispana (ekzemple solo sen akcento aŭ Qatar kaj quorum uzante la literon c anstataŭ q), kaj Reyes analizis komentojn en interreta forumo responde al interreta tagjurnala artikolo kiu anoncis tiujn ortografiajn reformproponojn.

Preskaŭ 90% de la komentoj en la reta forumo estis kontraŭ la proponoj, kio fakte similas al la rezultoj de opinioenketoj pri pasintaj lingvaj reformoj de la franca kaj germana. Proksimume 28% de la komentoj temis pri la opinio ke la membroj de la RAE ne sufiĉe subtenas la statuson, purecon, aŭ belecon de la hispana lingvo, kaj 23% de la komentoj plendis ke la proponitaj ŝanĝoj estas sensencaj aŭ nelogikaj. Aliaj 23% konstatas ke la proponitaj ŝanĝoj malplivalorigos la lingvon, kaj proksimume 13% ne akceptas ke iu instituto preskribu la manieron de lingva uzado. Interese, la plejmulto de la relative malmultaj favoraj komentoj (proksimume 10%) ankaŭ mencias logikon, ĉi-foje dirante ke la proponoj estas logikaj, ne senlogikaj.

Reyes montras kelkajn el la komentoj, kio evidentigas kiel multaj homoj konsideras tiun reformon kiel personan atakon, kaj eĉ komparas ĝin al malpermeso spiri.

Aliaj komentantoj diris ke la membroj de la RAE estas mallaboremaj kaj enuiĝintaj, kaj ke ili ne rajtas ŝanĝi lingvon kiu apartenas al ĉiuj. Laŭ kelkaj komentintoj, tiuj ŝanĝoj intencitaj je simpligo de lingvo ankaŭ simpligos homajn pensojn, kaj la reformo kreas kulturan dekadencan kaj homan stultecon. Unu el la favoraj komentoj estas ke la proponitaj ŝanĝoj estas

venu al MELBURNO

por la 2015
kongreso de esperanto
kaj somerkursaro

Klasoj | Teatro | Muziko | Ekskursoj | Prelegoj
kaj pli

vizitu aea.esperanto.org.au por pli da detaloj

2-11 Januaro 2015

pozitivaj, ĉar ili faciligas la lernadon de la lingvo kaj pro tio faciligas komunikadon. Unu komentanto diris ke lingvo devas servi la homaron, kaj alia feliĉas ke la hispana lingvo estas evoluiganta.

Kiel Reyes diras en sia artikolo, estas interesa fakto ke reformoj de la hispana kaj aliaj lingvoj en la pasinteco ĉiam estis altirantaj fortajn malfavorajn reagojn, sed finfine ili estis akceptataj, kaj la ŝanĝita uzado poste iĝas normaligita formo de la lingvo. Tamen, eĉ se la reagoj nur estas unuaj kaj tujaj reagoj, kiuj eble ne daŭros, ili montras kiom ofendiĝemaj homoj povas esti je proponoj de lingva planado. Kaj tiuj proponitaj ŝanĝoj nur estas ekzemplo de relative malgranda lingva planado—imagi reagojn al grandskala debato pri nacia kaj internacia oficiala enkonduko de Esperanto!

Kiel esperantistoj, ni ĝenerale havas specialajn opiniojn pri lingva planado. Do, karaj legantoj, bonvolu pensi kiel vi reagus. Unue, imagi similajn proponojn je ŝanĝoj de via gepatra lingvo. Kiel vi reagus? Due, pensu kiel vi reagus al proponitaj ŝanĝoj de Esperanto. Ne forgesu ke ni ankaŭ havas lingvan akademion kiu ankaŭ ofte altiris multe da kritiko en la pasinteco.

Sekretoj de la Insulo King

DE IAN MCARTHUR (TASMANIO)

En septembro de 2013, mia filino kaj bofilo flugis el Melburno, Viktorio, al la Insulo King. Samtempe mia edzino kaj mi flugis el Wynyard, Tasmanio, al la sama ventoblovata insulo en la Markolo Bass, rekte en la vojo de fortaj okcidentaj ventoj. De la aero ni vidis ventoturbinojn kaj ankaŭ ĉie vicojn da arboj uzitaj kiel barieroj kontraŭ la vento.

Je iom antaŭ la sesa vespere, ni surteriĝis kaj ni ĉiuj kunvenis ĉe la malgranda flughaveno. Tie atendis nin nia aŭto kiun ni estis mendintaj tri tagojn antaŭe. Ni veturis suden al la ĉefurbo, Currie, kaj de tie trans la insulo al nia luita feria hejmo ĉe Grassy sur la orienta marbordo.

Ĉi tiu estis nia unua vojaĝo al la insulo, kaj ni sciis ke la insulo estas bone konata pro ĝia fromaĝo kaj kremo, sed ni ne sciis pri la graveco de la produktado de laminario por la insula ekonomio.

Hazarde, iun tagon, je la malalta tajdo ni vidis laboriston kiu rikoltis laminariojn de la marbordaj rokoj. Liginte sian ŝnuron al aroj de la maralga, li vinĉis ilin el la akvo al sia ŝarĝaŭto kaj tiam li portis la plenan ŝarĝon al la apuda fabriko por sekado kaj procezado, antaŭ eksporto al Skotlando kaj Norvegujo kie 380 tipoj

de alginato estas ĉerpitaj.

Laminario (aŭ pli precize alginato) estas uzata en pli ol mil produktoj, ekzemple en glaciaĵo, kremo, saŭco, siropo, fruktotrinkaĵoj, biero, lagero (por ŝaŭmo produktado), ciro, dentopasto, ŝmiraĵo, gluo, ludiloj, ceramikaĵoj, kajeĉ en veldaj bastonoj kaj eksplodaĵoj ktp. En unu formo aŭ alia estas tre probable kaj ni ĉiuj manĝas, trinkas, ke iel ĝuas la avantaĝojn de laminario ĉiutage.

La produktado de laminario estas nun daŭra industrio kiu enspezas milionojn da dolaroj por la insulo, kaj ĝi ankoraŭ ne atingis plenan potencialon sur la insulo.

Post tiu vojaĝo, mi estas nun multe pli konscia pri la vasta gamo de ĉiutagaj produktoj kiuj uzas la alginaton troveblan en laminario.



Currie, ĉefurbo de la Insulo



Insulo King



Laminario trovita sur la marbordo

Kion ni manĝos en la estonteco?

DE LA ESPERANTO-RONDO DE WELLINGTON

Dum kunveno ni parolis pri la kreskanta loĝantaro de la planedo kaj demandis ĉu estos sufiĉaj manĝaĵoj por ĉiuj. La solvo prezentis sin tuj: tro da homoj, do manĝu kelkajn! Aŭ, eble ne.

Pro la fakto ke membroj de nia Rondo estas tre vojaĝemaj, ni rimarkis ke en aliaj landoj oni manĝas katojn, kanguruojn, insektojn, hundojn, ĉevalojn, helikojn, balenojn kaj aliajn bestojn kaj plantojn kiuj ĝenerale ne plaĉas al ni en Nov-Zelando. Tial, por solvi la problemon de troaltiĝo de la monda loĝantaro, ĉu ni devos manĝi novajn, nekutimajn manĝaĵojn en la estonteco?

Unu el la membroj de nia Rondo estas Chips (aŭ Ĉipso kiel ni nomas lin), ne tre afabla kato ĉar li gratas sian estrinon kaj vizitantojn. Ni proponis manĝi Ĉipson (sed li forkuris dum diskuto de ĉi tiu temo). Kial ne? Sur toasto kun terpomfritaĵoj kaj tomata saŭco kaj glaso da ruĝa vino. Do, ĉu tiu estas bona ideo? Jes, tiu povas esti tre bona ideo sed prezentas sin kelkaj problemoj, ekzemple logistikaj demandoj. Oni devas aranĝi inspektadon far bestkuracistoj por kontroli la kvaliton de la viando kaj manko de malsano. Oni devas havi oficialan atestilon de besta sano. Post ricevo de tia atestilo oni devas aranĝi buĉadon en kondiĉoj sub oficiala kontrolado. Kie oni rajtos

vendi katviandon? Ĉu en restoracioj, superbazaroj, aŭ en surstrataj vendlokoj por hejmenporti manĝaĵojn? Ĉu surrete?

Kaj kio estos la prezo de katviando? Ĉu ĝi estos luksa frandaĵo? Eble jes je la komenco pro ĝia rareco sed, post populariĝo, la prezo plej verŝajne malaltiĝos. Kaj ĉu pagi pli laŭ la speco de kato? Ekzemple, kiom vi pagus por purrasa katsandviĉo?

Ni ne forgesu la eblecon eksporti katviandon kaj aliajn katdevenajn produktojn de Nov-Zelando al aliaj landoj. Eble nov-zelanda katviando havos pli altan valoron ĉar eksterlandanoj ĝenerale akceptas ke Nov-Zelando estas pura, verda lando kun altkvalitaj manĝaĵoj. Kio estos la nomo de nia eksportota produkto? Ĉu 'Katatonika Katviando'? Bedaŭrinde ni ne estas en Hispanio ĉar 'Kataluna Katalakto' estus tre alloga nomo por



nia varo.

Ĉu estos sufiĉaj katoj? Ĉu ni devos grandskale bredi katojn por niaj klientoj kaj ĉu tio estos efika? Supozu ke oni devas nutri ĉiun katon per 200 gramoj da viando kaj 200 gramoj da akvo tage.

Se oni buĉas la katon post du jaroj kaj ĝi pezas 6 kg, kaj duono de ĝi estas manĝinda, oni uzis 146 kg da viando por produkti 3 kg da kata viando. Tial, la efikeco estas $3/146 = 2\%$ kaj ni malŝparis 143 kg da viando kaj 146 kg da akvo. Aldone, por bona sano, la dieto de kato devas konsisti el malmultekostaj visceroj (por vitaminoj kiujn katoj mem ne povas produkti), kaj viando, kun malmulta graso, kaj povas havi bazon el malmultekosta amelo, ekzemple bruna rizo (ĉar kato ja produktas amelazon). Oni eble povos vendi la katan felon, sed ŝajnas ke bredi katojn ne estas solvo al nia problemo. Katamantoj – restu trankvilaj!

La solaj bestoj ekspluatindaj sen tiu malefikeco estas sovaĝaj bestoj kiuj estas multnombraj, bongustaj, facile kapteblaj kaj kiuj konkuras kontraŭ homoj por nutraĵo. Eble emuoj, kolomboj kaj aliaj birdoj, lokustoj (se oni povas kapti ilin), skaraboj, kunikloj, ratoj kaj aliaj ronĝuloj, kanguruoj, cervoj kaj kaproj kaj aliaj similaj bestoj. Eble indas bredi milionojn da insektoj. Nov-Zelando havas multajn diversajn indiĝenajn insektojn. Ekzemple, maorioj kutime manĝis huhu-raŭpojn. Tiuj estas tre dikaj kaj facile manĝeblaj sen kuir

(sed pli bongustaj se oni kuiras ilin kun cepoj). La gusto de la huhu-raŭpo dependas de la arbo en kiu ĝi vivas. Tial, jen ebleco por diversaj gustoj kaj prezoj!

Por esperantistoj ni havos bonan ŝancon por uzo de Esperanto en komerco. Per bona merkato ni povos ligi la ideon de bona kvalito de lingvo kun bona kvalito de ekzotaj nutraĵoj.

Feliĉe, ni trovis solvon por la problemo de troa monda loĝantaro. En la venonta numero de ESK ni kunsendos mendilon por niaj novaj manĝproduktoj. Mendu rapide antaŭ ol la prezo troaltiĝos!

Rimarko de Ĉipso: Certe la verkintoj de ĉi tiu artikolo ŝercas, ĉu ne?

Postscribo: Fakte, ni ĵus rimarkis ke oni manĝas katojn en Peruo. Laŭ novaĵo en la Interreto (kaj oni ne ĉiam povas fidi je surretaj novaĵoj) oni manĝas katojn en La Quebrada, vilaĝo sude de Lima, kiel parto de religia festivalo (ni ne scias pri kiu religio temas). Perua parlamentano jam skribis al la urbestro por peti ke oni ne permesu manĝadon de katoj.



La Guto Malgranda

DE JONATHAN MOYLAN
(NOVKASTELO)

Kiam oni veturas okcidenten post la Granda Divid-Montaro, la tero etendiĝas ebena ĝis la horizonto. Jen la grandioza lando de la Gomeroj. Tiu vasta lando estas la dua plej granda indiĝena nacio en Novsudkimrujo krom la pli suda Ŭiradjuri. La Gomeroj estis fieraj milituloj: la rakonto de la Ruĝa Tribestro faras mensbildon de tiu popolo kiu neniam hezitis defendi sian landon.

Nun la tero abundas kun kvazaŭ senlimaj kampoj, semitaj de tritiko, kotono, sorgo kaj legumenacoj, inter kampoj por bovoj kaj ŝafoj. Iom kaŝitaj estas provoj de la terura frua konflikto inter Gomeroj kaj la nove venintaj eŭropidoj. Unu el la malmultaj publike konitaj historioj estas la masakro ĉe Myalls Creek – la sola fojo ke eŭropido estis kondamnita pro indiĝena masakro. Nun la Liverpool Plains estas la nutrejo de Novsudkimrujo: pli ol triono de la tritiko produktita en Novsudkimrujo venas el tiu regiono. Malofte oni pensas pri la bienistoj kiam oni iras al nutro vendejoj, sed senĉese, ĉiutage, miloj da homoj laboras por produkti manĝaĵon por Aŭstralio kaj la tuta mondo. Ekzistas en la mondo nur kelkaj regionoj kie la nigraj grundoj estas tiom fekundaj ke eblas semi dufoje ĉiujare, kaj unu el tiaj valoraj kamparoj situas ĝuste tie, post la Divid-Montaro.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, nova konflikto grandiĝas, ĉifoje sen perforto, kaj kreas strangajn aliancojn. Bienistoj, Gomeroj, kaj ekologiemoj staras unu apud la alia kontraŭ nova minaco. La fortiĝanta senso de komunumo kaj nelacigebla volo por demokratia ŝanĝo faras ke, de tempo al tempo, la popola volo sukcesas.

Mia nomo estas Jonathan Moylan. Mi naskiĝis en la marborda urbo Novkastelo, filo de irlandida patro kies familio loĝis en kampara Viktorio dum pluraj generacioj, kaj de belga patrino, kiu donis al mi pasion por lingvoj, konscion pri diverseco, kaj pli larĝan perspektivon. Mia hejmurbo malbonŝancis – ĝi estas la plej granda karb-eksport-haveno en la tuta mondo. Konsekvence, la pli altaj niveloj de polvo en la aero kaŭzas pli da spirmalsanoj, aparte al infanoj, sed tamen registaroj subtenas planojn por pli ol duobligo de la kvanto de karbo eksportota el Novkastelo. Neniu povas nei la fakton ke la historio de nia urbo kaj regiono estas ligita al karbo. En la jaroj antaŭ la grandegaj minkamionoj, granda parto de la popolo laboris por la karbominoj, rekte aŭ nerekte. Aŭtomatiĝo signifas

ke la industrio ne plu bezonas tiom da laboristoj sed povas rapide pliigi la produktadon. Mi memoras, kiam mi estis knabo, vojaĝon en aŭto en la Huntera Valo.

Nun mi ofte vojaĝas laŭ la New England-Ĉefvojo, sed ĉio ŝanĝiĝis. Grandegaj minoj videblas laŭ la tuta vojo inter Singleton ĝis post Muswellbrook. Tutaj komunumoj, kiel Wybong, ne plu ekzistas. Ili antaŭ nelonge truiĝis. Renkontintaj la translokiĝintajn eksenloĝantojn de Wybong, la furiozo estas evidenta. La sento de senpotenteco estas aŭ deprimiga aŭ koleriga. Nun, fosinte laŭ-eble plej multe el la Huntera Valo, la kompanioj etendiĝas okcidenten – rekte al la Liverpool Plains.

Kiel junulo, ne eblas al mi forgesi ke estas ekologia limo al la kvanto da karbo kiun oni povas bruligi se ni volas eviti la plej danĝerajn klimatajn skuojn. Renovigebla energio ekzistas, sed ne havas tiom da subteno de registaroj kiom karbo. La estonteco de Pacifikaj insuloj, la Arkta regiono, kaj la intenseco de arbaraj fajroj dependas rekte de la sukceso de kampanjoj en Novkastelo kaj nia regiono. Kaj, esperinde, karbo-kompanioj sukcesas malpli ofte. Minoj

ĉe Bickham, Awaba, Bulga en nia regiono, kaj Felton en Kvinslando jam devis cedi kontraŭ tro fortaj komunumaj streboj por defendi terenon, sanon, kaj akvon. La strategioj ĉiam havas plurajn taktikojn – politika premo, premo por ŝanĝi investadon, leĝa agado kaj, kiam necese, neperforta rekta agado. Konservativaj bienistoj pli ofte estas arestitaj apud indiĝenoj kaj ekologiemoj ĉe blokadoj. Ŝtata kaj federala politiko estas nekuraĝiga sed la pligrandiĝanta movado signifas ke ŝanĝo estas neevitebla.

Mi vojaĝis al Maules Creek en Aprilo pasintjare kaj tie renkontis Phil Laird. Nur 60 homoj ankoraŭ loĝas en Maules Creek, kaj jam kvarono de la popolo devis translokiĝi. La familio Laird estis la unua eŭropida familio en Maules Creek, antaŭ kvin generacioj. Kaj rekte apud Maules Creek estas kuriozaĵo kiu portas (malsame skribita) la nomon de la familio – la Ŝtat-Arbaro Leard. Ja, malgraŭ la senarbigado en la regiono por agrikulturo, larĝa sekcio de arbaro ankoraŭ restas tie. Ĝi sidas inter Monto Kaputar norde kaj la Pilliga Arbaro sude kaj estas gravega natura koridoro por migrantaj bestoj, kiel la koalo, la



Whitebox Gum-arbaro



Jonathan Moylan parolas ĉe protesta kampadejo



Distra momento dum prelego de Jonathan

flavaventra punktovosta vesperto, la reĝa mielmanĝa birdo, kaj la Swift-papago. Kvarono de la arbaro estas kritike minacita Whitebox Gum-arbaro. Antaŭ kelkaj jaroj, nova speco venis al la sudorienta angulo de la arbaro – du karbominoj. Vi jam povas vidi ĉe Google Earth kiom ili estas grandaj, sed estas intenco ke la minoj duobliĝu nun. Eĉ pli granda mino, tiu de Maules Creek, tre baldaŭ provos detrui la nordokcidentan parton de la arbaro. Se Whitehaven Coal kaj Idemitsu sukcesas, nur du frakcioj de la arbaro restos kaj la valorega akvonivelo malaltiĝos je pli ol 5 metroj. Whitehaven, kies estro estas eksvic- ĉefministro Mark Vaile, fincas sian minon kun la helpo de prunto de ANZ – pli ol miliardo da aŭstraliaj dolaroj kiu venas el la kontoj de ĉiutagaj aŭstralianoj kiuj ne konscias ke la banko uzas sian monon tiel.

La komunumo ĉe Maules Creek kampanjis preskaŭ sola por protekti la estontecon de la komunumo ekde kvar jaroj. Sed en Aŭgusto pasintan jaron, mi kaj alia persono faris tendaron en la arbaro – la tendaro restas tie kaj grandiĝas, kaj ni faras rektan agadon kontraŭ la minoj. Pli grandaj organizaĵoj nun subtenas la kampanjon kaj estas bona ŝanco ke la minprojekto kolapsos



Publika protesto por subteno de Jonathan dum leĝa disputo

antaŭ la detruo de la arbaro.

Vi eble jam aŭdis pri ŝerca mistifiko en Januaro kiu kaŭzis ke mi nun alfrontas dekjaran malliberiĝon. Mi ŝatus skribi pri tio, sed devos atendi ĝis post la fino de la leĝa procedo. Sed kio ajn estos la rezulto, ni ĉiuj devos alfronti la venontan generacion kaj povi honeste respondi al la demando – kiam ankoraŭ estis ŝanco eviti danĝeran klimatsanĝon, kiam la karbindustrio volis duobliĝi – ĉu vi agis sufiĉe por mi? Neniu el ni povas honeste jesi al tiu demando. Tamen, la movado grandiĝas kaj mi esperas ke homaranoj implikiĝos. Eĉ se vi ne povas vojaĝi al la Stat-Arbaro Leard (kaj ĝi estas tamen bela aventuro), trovu grupon apud vi kiu faras ion kontraŭ novaj karbominoj aŭ karbvejna gazo, publike insistu ke vi ŝanĝos vian bankon se via banko daŭras investi vian monon maletike, demandu al via parlamentano kion ŝi aŭ li faras por haltigi novajn karbominojn, skribu al ĵurnaloj, telefonu al radioprogramoj, kaj lernu pri neperforta agado (jes, ekzistas kursoj!).

Kaj, se mi finfine malliberiĝos, eble leteroj en la internacia lingvo devigos la cenzuriston lerni la lingvon!

Eĉ guto malgranda, frapante konstante, traboras la monton granitan!



Jonathan (meze) kun sia leĝisto John Sutton (maldekstre)

Gloraj tagoj en Kanbero kaj postkongresaj pensoj

DE BOB FELBY

En la universitato de Kanbero unu el sennombraj konstruaĵoj nomiĝas Ursula Hall. En ĝi la estraro de AEA organizis la tradician kongreson kaj somerkursaron de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Partoprenis en ĝi proksimume 52 fervoraj gesamideanoj el Koreujo, Nepalo, Indonezio, Germanujo, Nov-Zelando, Vjetnamujo, Nov-Kaledonio, Hungarujo kaj eĉ pli multaj el Aŭstralio. Povas esti neniu dubo pri tio ke mi forgesis kelkajn samideanojn el aliaj landoj, pro kio mi petas vian pardonon.

Mi alvenis ĉirkaŭ la 15a horo vendredon la 3-an de Januaro. Tiam ne estis multaj aliaj, sed ili ekvenis kelkan tempon iom pli poste.

En la vespero ni kunvenis en tre pura, bela kaj grandega ĉambrego, sed bedaŭrinde ĝi havis la plej malbonan akustikon, kiun mi iam vidis (aŭ aŭdis) en mia longa vivo. Kiam iu, ekzemple la estraro, parolis de sur la podio, nur tiuj sidantaj en la plej antaŭa vico de grandaj kaj komfortaj mebloj povis ion ajn aŭdi. Troviĝis neniuj mikrofonoj aŭ laŭtparoliloj. La tapiŝoj kaj la komfortaj sofoj kaj brakseĝoj kaŭzis ke la sono estas neaŭdebla.

Nur kelkajn tagojn poste ne-estrarano Roger Springer iris al la oficejo por demandi ĉu ekzistas



Esperantaj flagoj tenataj de kvar eksterlandaj Esperantistoj kaj duobla estas la efiko, ĉu ne! Starantaj estas Eko Nur Syah Hidayat kaj Andei Samosir el Indonezio. Sidanta estas Lumera Nohill el Suda Koreujo kaj Rouan Van Ryn el Novzelando.



Dum prelego de Marcus Gabor el Hungarujo



Yvan Serve el Novkaledonio prelegas pri sia Pacifika Oceana lando



Vigle instruas Bharat, kies lecionoj emfazis pri konversacio de la internacia lingvo



Giles Thompson kun kelkaj el liaj entuziasmaj komencantaj studentoj

mikrofono en la universitato. Oni donis al li nur unu, kaj per ĝi la parolanto povis esti aŭdata en la tuta salonego, sed, se mi bone memoras, nur unu parolanto uzis ĝin. Al la plej multaj parolantoj necesis parolante svingi ambaŭ brakojn, kio malebligis la tenadon de mikrofono en la mano.

Venontajn fojojn la estraro mem aĉetos almenaŭ 8 mikrofonojn kaj kelkajn laŭtparolilojn, ĉar vere oni ne povas sidi, kvankam tre komforte, aŭdante nenion.

Trevor Steele gvidis kvizludadon, kiu amuzis nin ĉiujn. La premio estis nur la fiero de la gajninto. Okazis ankaŭ ekumena diservo. Tiu estis eĉ tre interesa. Oni aŭdis pri multaj malsamaj religioj kaj lernis multon. Okazis ankaŭ kelkaj ekskursoj al tre interesaj lokoj en la Aŭstralia Ĉefurba Teritorio. La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis multaj kaj diversaj. Mi supozas ke la plej multaj

el ni manĝis multe tro ol estis bona por niaj sanoj. Sed ili bongustis.

Okazis Nepala Vespero prezentita de Indu Thapalia kaj Bharat Ghimire. Ni aŭdis ĉion sciindan pri Nepalo. Poste Indu prezentis al ni nepalan dancon. Multaj belegaj samideaninoj iom post iom partoprenis en ĝi.

Jonathan Cooper parolis brile pri "arto" kaj la "nova retejo". Poste parolis Lumera Nohill pri la Korea Esperanto-Junularo. Necesas aldoni ke ŝi tre klare, laŭte, kaj senerare parolis. Estis tre granda plezuro aŭskulti ŝin.

Dmitrij Luŝnikov parolis pri Ideoj, Esperanto-Televido, Esperanto-Domo, kaj Lingvaj Festivaloj. Fine Rainer Kurz montris plurajn filmetojn el filmkonkurso okazinta en Germanujo.

Okazis lingvofestivalo ankaŭ ĉe ni. Mi mem partoprenis la prelegon pri aŭstraliaj indiĝenaj lingvoj de Sandor Horvath, kaj tiun pri la korea lingvo de Lumera Nohill- Lee. Okazis ankaŭ debato inter Daniel Kane kaj Marcelo Leereveld. Temis pri la sukcesoj spertitaj enkondukante Esperanton en la lernejojn. Kompreneble mi ne povis ĉeesti ĉion, sed mi ĝuis la prelegon (daŭras paĝo 17)



Rainer Kurz staras kaj prelegas pri sukcesa filmkonkurso



Ekzerco de teksto de teatraĵo. Maldekstre al dekstre estas Jonathan Cooper, Bharat kaj Kieu



Dum la nepala prelego de Bharat, kiu portas nepalan ĉapelon, Indu komputile kontrolas la elektronikan vidan prezentadon



Indu montras nepalan dancon kaj la aŭdantaro estas invitita partopreni dum la ludo de registrita ĝoja nepala dancmuziko



Dum la altnivela leciono de Trevor Steele. Legata en lia klaso estas la libro *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*, kiu estis romano verkita de Trevor Steele.



AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

Malantaŭa vico: Bradley McDonald, Jonathan Cooper, Terry Manley, Joanne Johns, Giles Thompson, Hazel Green, Kam Lee

Dua vico: Bob Felby, Charles Stevenson, Paul Green, Roger Springer, Mei Springer, Katja Steele, Alan Bishop, Jennifer Bishop, Sandra Connors, Dianne Mitchel, Huigh Malcolm, Marcus Gabor, Rainer Kurz, Marc Schmidt, Esther Parris, Steven Garamy, Trevor Steele, Yvan Serve, Abid Afridi, Max Wearing



KANBERO, 9a de JANUARO, 2014

Unua vico (sidanta): Eileen Jones, Carol Linnane, Brendan Linnane, Elisabet Hellenpach, Bharat Ghimire, Indu Thapalia, Sandor Horvath, Andre Samosir, Eko Nur Syah Hidayat, Dianne Lukes, Indrani Beharry-Lall, Marcel Leereveld, Heather Heldzingen, Kieu Tu Duong, Margaret Chaldecott, Nicole Else

"Arĥiva Historio de AEA" de Huigh Malcolm kaj Terry Manley.

Roger Springer parolis pri sia "Ŝlosilo", Daniel Kane pri la fama Jørgen Utzon kiu konstruis la mondfaman Operejon en Sidnejo, Jennifer Bishop lerte parolis pri ILEI, kaj ĉarma Maria Staykova parolis pri Belka Beleva. Vere tre belega kaj kortuŝa parolado. Mi tre ĝuis ĝin!

Trevor Steele parolis pri la "Aŭstralia Antologio", Heather Heldzingen pri la Universala Kongreso en 2013, Marcel Leereveld avertis nin kontraŭ nia misuzado de Esperanto, kaj Sandor Horvath demandis ĉiujn el ni pri niaj opinioj pri la kongreso kaj somerkursaro samtempe petante niajn sugestojn por la venontaj du kongresoj en 2015 kaj 2016. La koruso belege distris nin per kortuŝe belegaj kantoj. Okazis ankaŭ pluraj teatraĵoj. La tago finiĝis per "diskoteko", sed tiam mi jam kuŝis profunde dormanta en mia lito.

La antaŭlastan tagon okazis pluraj ekskursoj. Unu tre interesa al loko, de kie iuj sciencistoj povas esplori kaj komuniki kun Marso, Jupitero, kaj kiu ajn alia planedo. Ni iris ankaŭ vidi la t.n. "Arboretum", kie oni studadas plantojn kaj arbojn, tre interesa loko, ni tagmanĝis tie.

La festmanĝado okazis en hinda restoracio kie la manĝaĵo estis tre bongusta sed la bruoj en la loko estis neeltenebla. Oni disdonis diplomojn ktp, kaj poste la aŭkcio okazis hejme en la kolegio.

Entute treege bonega kongreso. Ĉiuj



Klariga momento dirita de Eko dum la indonezia prelego. Indonezio estas unu el la proksimaj najbaroj de Aŭstralio, ĉu ne?



Prelego pri la hungara lingvo parolita de Garbo, kiu diskutas pri aspektoj de la hungara gramatika sistemo



Marco Schmidt prelegas pri la angla lingvo kaj diskutas pri kelkaj bildaj enigmoj



Dimitri Lushnikov gvidas lingvan kvizon, kiu okazis dum la fino de la lingva festivalo. Kelkaj homoj memoris multe pri la prelegoj!



Jennifer Bishop prelegas pri ILEI



Paco estas restarigita inter du landoj dum la teatraĵo

Neformala Esperanta kunsido inter la indoneziaj reprezentantoj kaj la Aŭstralia Esperanta estraro

homoj estis feliĉaj, helpemaj, ktp. La ĉambroj ĉiuj estis puraj. La necesejoj kaj duŝejoj, ankaŭ la vestlavejoj estis puraj, belaj kaj facile uzeblaj. Estis eĉ tre granda ĝojo lerni ion novan kaj ekkoni geamikojn el la tuta mondo. Mi estas eĉ tre dankema, ĉar mi rajtis partopreni.

Do, kiel mi jam iam kaj ie konfesis, la kongreso en Kanbero estis, laŭ mia modesta opinio, tre sukcesa, precipe ĉar ĝi amuzis kaj interesis min. Venis, se mi bone memoras, multaj esperantistoj tien, kaj kiel espereble ankaŭ vi memoras venis ankaŭ mi, subvenciite de multaj bonkoraj gesamideanoj.

Ĉiam dum mia longa vivo interesis min renkontiĝi kun homoj el aliaj, prefere ekzotaj landoj kiaj ekzemple Svedujo kaj Germanujo, ĉu ne? Sed ne nur el tiuj tre belegaj landoj, ankaŭ homoj el Aŭstralio interesas min. Oni povas de ili lerni multon pri homoj en aliaj landoj, ĉar nuntempe loĝas ĉi tie en Aŭstralio homoj el ĉiuj landoj de la mondo. Oni do ne plu bezonas vojaĝi malproksimen, oni havas je sia dispono la tutan mondon je siaj fingropintoj.

Kaj eble por ĝojigi min eĉ pli, en la Aŭstralia Nacia Universitato mi renkontiĝis kun multaj, eĉ multegaj, belegaj kongresan(in)oj el Azio, Eŭropo ktp. Eble ne ĉiuj komprenas tion, sed mi estas mondcivitano kaj mia koro batas multe pli rapide kiam mi vidas homojn, prefere esperantistojn el aliaj landoj. Sed tio ne daŭros



ĉiame. Eŭropo jam iĝis unu granda lando. Mi atendas ke baldaŭ ankaŭ aliaj kontinentoj decidus sekvi la spurojn de tiu mondparto, en kiu mi iam naskiĝis je la 2-a horo en la mateno. Aŭstralio estas jam unu granda lando, Afriko ankoraŭ ne estas, Ameriko ne estas, aŭ ĉu? Azio ne estas. Mi petas vian pardonon se mi eraras pri tio, miaj scioj pri geografio ne estas kontentige bonaj, certe ne bonegaj.

Mi povas jam nun imagi ke iam, espereble post nelonge, la tuta mondo estos unu eĉ tre grandega lando. Sed eble ne. Mi pensas nun pri niaj tro multegaj politikistoj. Ĉu ili vere deziras tion? Ĉu ili vere deziras ke ni ĉiuj vivu pace, kontente, kaj feliĉe? Kontraŭ kiuj ili povus sendi senkulpajn gejunulojn al la batalkampoj por mortigi unu la aliajn? Ne, verŝajne necesos unue seniĝi de politikistoj, kaj tiam ni eble povos revii pri tutmonda paco. Aŭ ĉu vi opinias alie?

Zamenhof havis la saman revon kiel mi, ĉu ne? Li antaŭvidis ke iam ni ĉiuj estos unu granda familio kun unu komuna lingvo. Ankaŭ mi revas pri tio. Tial mi provas lerni la



Seminario pri refaro de la menua sistemo de la nova AEA



Skandalo estas malkovrita dum la teatraĵo

lingvon, kiun li proponis al ni ĉiuj. Mi jam provis lerni la germanan, laŭ mia opinio tre belegan lingvon, sed ĉar mi ne sufiĉe diligente studas, mi ankoraŭ ne sukcesas esprimi min ĝuste en ĝi. Mi esperas ke mia dana (mia denaska lingvo) estas senerara, sed pri mia Esperanto nur vi povas juĝi.

Sed mi promesas daŭre provi esprimi min en la amata lingvo de Zamenhof. Kion vi promesas? Espereble la saman kiel mi, ĉu ne?

Koran dankon al vi ĉiuj.



Interesa prelego pri bildrakontoj parolita de Marc Schmidt. Ĉu vi informigis pri liaj verkitaj bildrakontoj, ekzemple "Rakonto de Ovoj"?



Alan Bishop prelegas pri aspekto de matematiko



Bonvenon al la Soifla Drinka Restoracio, "Thirst Bar Restaurant". Feliĉa bankeda momento kaj tempo por festi



La esperanta kantaro kantas dum la korusa kaj teatraĵa vespero. Kelkaj el la kantitaj kantoj estas "Stelo de majo", "Jen Mia Preĝo", "Kara Bara Uira Kana" kaj "La Kolonia Knabo"



Sukcesa internacia Esperantofilma konkurso

DE RAINER KURTZ (GERMANIO/SIDNEJO)



Dum la donadoj de la ĉefaj pladoj, kiuj certe estas bongustaj. Malgraŭ la verŝajna trankvila etoso, fakte okazas inundo de laŭta babilado!



Dum manĝado kaj tempo por ĝui la esperantan amikecon.



Verŝajne ĉiu memoras la kongreson kiel sukcesan ĝojan aferon. Eĉ celebras la homoj, kies gorgo aspektas sufokpremita, ĉu ne?!



En Ursula Kolegio post la aŭkcio, kiu okazis post la bankedo. Fino de la kongreso kaj ĝis la venonta revido, ĉu ne?!

Kiel la ideo de filmkonkurso ekis?

Dum 2012 multaj Esperantaj asocioj diskutis pri kiel oni festu la 125-an datrevenon de la kreo de Esperanto (okazis en 1887 la presado de la unua libro de Esperanto). Dum vizito en Sidnejo, mi rimarkis la 'Tropfest'-filmfestivalon kiu estas la plej granda konkurso por mallongaj filmoj en la mondo. La prezento de proksimume 800 filmoj dum ĉi tiu evento tre imponis min; tiel, mi ekkonsciis pri la ideo de Esperanto-filmkonkurso.

Kiuj estis la financaj subtenantoj de la konkurso?

La Germana Esperanto-Asocio (GEA) ricevis proponon de mi pri faro de Esperanta filmkonkurso. Diskutinte pri la filma afero, GEA decidis buĝeti 5000 eŭrojn por la premioj. Mono por organizado venis ĉefe el la Rainer Kurz-fondaĵo. Mi ankaŭ petis monon de la Federacio de Novsudkimrujo por subteni la filmkonkurson, sed mi ne sukcesis.

Kiuj estis la organizantoj?

La Germana Esperanto-Asocio estis la oficiala organizanto de la filmprojekto, kaj mi estis la respondeculo. Aliaj organizantoj laboris kiel tradukistoj (inter ili Volo

Guetling el Sidnejo), varbistoj, juĝistoj, teknikaj helpistoj, kaj ceremoni-organizantoj. Entute kunlaboris pli ol 20 personoj.

Kiuj kaj kiam estis la unuaj etapoj de la filmkonkurso?

Mi ne povis fari ĉion sola, mi devis serĉi homojn kiuj povas kontribui al la granda projekto. Speciale mi bezonis kunlaboranton kiu havas la bezonatajn filmteknikajn kapablecojn, ilojn, kaj tempon. Ankaŭ kontaktoj kun la filmindustrio estis bezonataj.

Mi volas mencii Max Höhnle. Li ne estas Esperantisto sed tre kompetenta, preskaŭ profesia filmfaristo. Li helpis min solvi la diversajn teknikajn defiojn kiuj devenas de la fakto ke la diversaj filmoj venis en multe malsimilaj teknikaj formatoj.

Ĉar Max jam partoprenis multajn germanajn filmkonkursojn ni povis multe profiti de liaj spertoj. Li ankaŭ alparolis germanajn filmakademiojn por trovi interesitajn filmfaristojn.

Je la komenco ni kreis reklamafiŝon de la filmkonkurso. Tiu afiŝo estis tradukita al la Esperanta, germana, angla, hispana, rusa, portugala, franca, kaj serba lingvoj. Dankon ankaŭ al Volo Guetling pro traduko de tiuj afiŝoj.

Ni uzis multajn reklam-kanalojn:

- ni konstruis retpaĝojn pri la filmkonkurso

- ni skribis leterojn al multaj fakasocioj kaj filmlernejoj

- ni faris kontakton kun diversaj Esperanto-asocioj – ekzemple la Brazila Esperanta Asocio formale subtenis la projekton kaj multege varbis interesatojn

- multaj artikoloj estis prezentitaj en diversaj ĵurnaloj kaj en elsendoj de radioprogramoj, kiel ekzemple Ĉina Radio Internacia, kiu ankaŭ intervjuis min pri la filmkonkurso

- Ĉina Radio Internacia faris propran retpaĝon, sur kiu oni povas vidi la filmojn – notindas ke filmoj sur YouTube ne estas videblaj al esperantistoj en Ĉinio.

Kiel vi verkis la kondiĉojn kaj regulojn de la konkurso?

Mi kunlaboris kun diversaj advokatoj kaj spertuloj pri filmkonkursoj por fari kondiĉojn kiuj estas laŭleĝaj kaj helpemaj por Esperantio. Tiel ni decidis ke ĉiu filmo estu sub la licenco de “Creative Commons (Krea Komunaĵo) (CC-BY)”, kio permesas al ni ke post

la konkurso ni povas uzi la filmojn laŭ ĉiu kondiĉo senlime. Resumo de la ĉefaj kondiĉoj estas jene:

- Ĉiu filmo estu maksimume 5 minutojn longa.

- La rajto pri la muziko por publika prezento devas esti certigita.

- La personoj en la filmo permesas la uzon por publika prezento.

- La filmfaranto garantias per sia subskribo ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniuj rajtoj de aliaj personoj estas lezigitaj.

- Post la konkurso la filmoj estos libere prezenteblaj por ĉiuj laŭ CCBY.

Ĉu estis reguloj rilate al permeseblaj filmformatoj aŭ ĝenroj?

Ĉio estis permesata! De desegnofilmoj al dokumentaj filmoj ĝis teatraj filmoj, ĉion ni volonte rigardos. La formato ne havis limojn; tial, la filmo povis esti registrata aŭ per poŝtelefono aŭ per profesia filmkamerao. Ĉiuj rajtis partopreni: amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikilaj agentejoj, studentoj, kaj kreemaj homoj el la tuta mondo.

Ĉu la temo de la filmo devis rilati al Esperanto?

La filmisto devis montri kion la lingvo Esperanto signifas al li aŭ ŝi, aŭ montri kiel oni povas entuziasmigi homojn pri Esperanto. Ne ekzistis limoj ĉe la interpretado. Du filmoj estis senditaj, sed ne estis akceptataj ĉar ili tute ne temis pri Esperanto.

Ĉu la parolata lingvo de la filmo povis esti en alia lingvo ol Esperanto?

Ĉiu lingvo de la mondo povis esti uzata. Tial, ne gravas kiun lingvon oni uzas. Ni ricevis filmojn en 7 lingvoj:

Esperanto: 44	germana: 4
franca: 2	angla: 2
portugala: 1	rusa: 1
hispana: 1	kaj unu filmo kiu uzis neniun lingvon.

Kiom da filmoj vi ricevis?

Ni ricevis 56 filmojn el 17 landoj:

Bulgario: 12	Germanio: 7
Brazilio: 5	Pollando: 5
Hispanio: 4	Svislando: 4
Slovakio: 3	Ukraino: 2
Ĉeĥa Respubliko: 2	Sudafriko: 2
Italio: 1	Kanado: 1

Benino: 1
Kongo: 1
Finnlando: 1

Ĉinio: 1
Rusio: 1

Aŭstralio estas la sola kontinento de kie ne venis filmo.

Kiuj estis la ĵuĝistoj?

La ĵuĝistoj estis Maximilian Höhnle, Rainer Kurz, diversaj GEA-estraranoj (Felix Zesch, Sebastian Kirf, Andreas Emmerich), membro de la Germana Esperanta Junularo (Liesa Marie Alfier), kaj Petra Dückerhoff (kiu havas esperantistan infanon kaj li ĵuĝis filmojn laŭ familia perspektivo).


Kiel la ĵuĝistaro elektis la plej bonan filmon?

La ĵuĝisto elektis la 3 plej bonajn filmojn (unu poento por la elektita filmo) kaj la 10 plej bonajn filmojn (unu poento por la elektita filmo). Mi kalkulis la sumon de poentoj.

Kiuj estis la premioj kaj kiuj gajnis?

La resume estas jene:

Plej bona filmo en Esperanto: €1000



Pasporta Servo! (Ukraino)- Bilda Resumo



Esperanto Muzikigas Vian Vivon (Ĉinio)- Bilda Resumo

Plej bona ideo: €1000
 Plej bona filmo: €2000*
 Premio de la publiko: €1000*
 * neeldonita pro buĝetaj kialoj.

Okazis la 9-an de februaro 2013, en Berlino, ceremonio por doni la premiojn al la gajnintoj. La premio por la plej bona filmo en Esperanto estis donata al "Pasporta Potenco", ukraina filmo de Oleg Zabolotnyi. La premio por la plej bona ideo estis gajnita de du filmoj: "Ideevolution" de Daniel Voss (Germanio) kaj "Ĉu vi imagas?" de Eva Fitzelova (Slovakio).

Ĉu vi deziras komenti pri la filmo kiu gajnis la unuan premion por la plej bona filmo en Esperanto?

La ukraina kontribuo konvinkis la ĵurion pro humoro kaj persona rilato. En ĝi Oleg Zabolotnyi rakontas kiel lia patro dum longa Esperanto-mondvojaĝo ekkonis belegan ukraininon kiu poste naskis bebon.

Ĉar ili ne havis komunan lingvon krom Esperanto, la infano iĝas denaska parolanto de Esperanto. Dudek kvin jarojn poste, la iama infano, la aŭtoro,

ankaŭ ekvojaĝas tra la tuta mondo per Esperanto kaj ekkonas sian amon.

Kaj pri la du filmoj kiuj gajnis la premion por la plej bona ideo?

La muzikfilmo "Ĉu vi imagas" donas fantazian bildon al la kanto de Johannes Müller. La kanto temas pri la revoj de homoj por krei sian estontecon. La designita filmo "Ideevolution" temas pri du filmistoj kiuj tage kaj nokte cerbumas pri kiel fari filmon pri Esperanto sen esti tro reklamstila.

Ĉu vi deziras komenti pri la aliaj filmoj?

La rezulto de la konkurso estas tutmonda artfajraĵo de kreemaj ideoj por filmoj de kvar kontinentoj. Tiel la konkurso montras la diversecon de la Esperanta kulturo. De amuzfilmo el Brazilo ĝis historifilmo pri la persekutado de esperantistoj sub Stalino (per la ekzemplo de la avo de la aŭtoro). Filmo el Kongo montras kiel Esperantoamikoj el Aŭstralio helpas por vojaĝi al Islando. La ĉina kontribuo montras sepdekjaran profesoron kiu restas kiel junulo pro sia ŝatokupo

Esperanto.

Ĉu vi renkontis kelkajn el la aktoroj, filmdirektoroj, kaj aŭtoroj de la filmoj?

Mi konas kaj jam renkontis kvin el la filmistoj. Unu el la pli bonaj filmoj estis parte farita de Johanas Müller kiu loĝas en mia urbo, Stuttgart. La filmistoj de la konkurso ĝenerale venas el tre diversaj partoj de la mondo kaj multaj kontribuantoj estas kaj estos novaj esperantistoj.

Kiel oni povas informiĝi pri la filmkonkurso?

Informo pri la filmkonkurso venas el leteroj kaj afiŝoj el filmaj akademioj. Rilata informo estas videbla ĉe:

esperanto.de/resumo-kurtofilmkonkurso-esperanto-125

kaj www.youtube.com/user/Filmkonkurso

Ĉu la aktoroj, filmdirektoroj, kaj aŭtoroj de la konkursaj filmoj intencas partopreni en aliaj filmoj?

Nuntempe mi opinias ke multaj filmoj estas faritaj pro la okazo de la

filmkonkurso. Ĝenerale ili ne estas filmistoj kaj ne regule kreas filmojn.

Mi estas fiera ke la konkurso instigis homojn el la tuta mondo fari siajn proprajn filmojn. Ekzemple en filmo el Siberia esplorinstituto la tuta dungantaro kunaktoris. La kontribuo de plena vilaĝo en Kongo verŝajne estas la sola filmo iam farita en tiu loko.

Ĉu vi organizas alian filmkonkurson?

Nuntempe mi ĉefe esploras kaj utiligas la oportunojn kiuj rezultis el ĉi tiu filmkonkurso. Mi kreis YouTube-kanalon kiu montras la pli bonajn filmojn. Konsekvence, la filmoj estas jam viditaj de pli ol dekkvin mil personoj.

Momente ni produktas DVD-on kiu montras la 35 pli bonajn filmojn. La plano estas senpage disdoni 5000 diskojn tra la tuta mondo. Alia plano estas krei subtitolojn por la 35 plej bonaj filmoj. Tiel ni povos utiligi multajn filmojn ankaŭ por neesperanteparolantoj.

Ĉu estas aliaj aspektoj kiujn vi



Supra maldekstro ĝis malsupra dekstro:
 Kiel oni faras argilan vazon (ES)
 Gajni per Esperanto (CH)
 Ach hätten sie doch (DE)
 Mi amas vin, Esperanto (RU)
 Parolas al mi? (DE)
 Ideeolution (DE)
 Ĉu vi imagas? (SK)
 Similitudes (ES)
 Vendredo (PL)
 Pli ol cent jaroj (BR)
 Esperanto lingvo de unueco (ZR)
 Esperanto (BJ)
 Esperanto Muzikigas Vian Vivon (CN)
 Esperanto-Geedzigas (BR)
 La fina venk' (DE)
 Baptopatro (BR)
 Esperanto 125 (BR)

deziras aldoni?

Mi deziras doni sincerajn dankojn al la multaj kunlaborantoj: Max pro multaj teknikaj helpoj; la tradukistoj pro la traduko de la afiŝo en diversajn lingvojn; esperantistoj en Berlino kiuj organizis la ceremonion por la transdono de la premioj al la gajnintoj; la juĝistoj kiuj pasigis multan tempon por rigardi kaj taksi ĉiun filmon; esperantistoj kiuj subtenis la projekton kaj varbis filmistojn por la konkurso; kaj fine la 56 filmistoj el 17 landoj pro iliaj kontribuoj.



De maldekste: Johannes Mueller (egalgajninto por la plej bona ideo kun filmo "Ideeolution"), Eva Fitzelová (egalgajninto por la plej bona ideo kun filmo "Ĉu vi imagas?"), Sebastian Kirf (Prezidanto de la Germana EsperantoAsocio kiu transdonis la premiojn), Āsa kaj Daniel Voss (egalgajnintoj por la plej bona ideo kun la filmo "Ideeolution")

Kanbera kongresa libroservo

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Ĉu havi aŭ nehavi AEA-libroservon estis unu el la temoj, pri kiu la partoprenintoj de la ĵus pasinta AEA-kongreso + somerkursaro diskutis – kaj ne findecidis. Havi libroservon dum la aranĝoj estas alia afero kaj laŭ mia sperto ĝi certe meritas JES-on.

La nuna libroservo vendis varojn en valoro de preskaŭ \$800. Inter ili estis aĵoj de la adelajda libroservo, libroj alportitaj de Kam Lee, de Marcel Leereveld, Marc Schmidt, de indonezianoj, de nepalanoj kaj de la AEA-stoko. Estis bone vidi la esperantistojn kun intereso trarigardantaj la vendotaĵojn, foliumantaj en libroj, demandantaj pri certaj titoloj aŭ temoj – kaj aĉetantaj.



Feliĉa kliento ĉe la kongresa libroservo, kie vendeblas multaj interesaj libroj. Mi scivolas kiom da dolaroj la apunto estas post kiam oni pagas per cent dolara monbileto por aĉeti la libron "Aŭstralia Antologio"?

Anoncoj

Programo de la franca Esperanto-kastelo en Greziljono (gresillon.org)

Jun 29-Jul 06: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj

Aŭg 01-09: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso

Aŭg 09-17: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto

Okt 24-Nov 01: AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj

20-a Ekumena Esperanto-Kongreso, 67-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 64a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia Trento - Cadine, Italio 16-23 aŭgusto 2014
Plenaj detaloj:

www.ikue.org/cz/EEK-Trento/EEK-Trento.htm



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Chris Krägeloh | President
chris.krangeloh@gmail.com

Bradley McDonald | Vice-President
Bradley.m@woosh.co.nz

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Rouan Van Ryn | Committee Member
a.tkanek@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Heather Heldzingen | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Indrani Beharry-Lall | Director of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Margaret Chaldecott | Director of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jonathan Cooper | Director of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

Esther Parris | Director

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

